

La ĉekon pri € 3000 danke akceptis la administranto de la ŝuldoj por la libro, pastro *Eichkorn*. Rimarkinde, la FAME-fondaĵo unuafoje distingis neneŭtralan verkon kaj "nur" per-Esperantan agadon. Inter la antaŭaj premiitoj estis ege rara la rekono de io farita en la propra lando de FAME: la pli fruajn premiojn gajnis *William Auld*, Skotlando; *Marjorie Boulton*, Anglio; *Gersi Bays*, Brazilo; KCE/CDELI (*Claude Gacond*) *La Chaux-de-Fonds*, Svislando; *Spomenka Stimec*, Kroatio; Heroldo de Esperanto en Bruselo; *Ito Kanzi* (Ludovikito), Japanio – *Richard Schulz* kaj *Bruno Vogelmann* kiel solaj germanoj.

La laŭdadon faris *Dipl. theol. Stefan Sassenberg* el *Leipzig*, lerte kombinante la aperon de tiu kunliga libro kun la situo de la urbo *Aalen* ĉe la iama romia limeso, kiu dividis du kulturojn, la romian kaj la ĝermanan, ĝis la misiistoj el Irlando kaj Skotlando venis kun la evanglio kaj forigis tiun dividon. La dankon de la premiitoj esprimis pastro *Eichkorn*, menciante la ĵusan aperon de mini-diskedo *Oeku-Rom* kiu surhavas i.a. midiojn\* por la melodioj de ADORU apud la tekstoj de la libro kaj la tuta Biblio kun la dua-kanonaj libroj en Esperanto (Londona Biblio) kaj en la germanlingva "unuforma traduko". Li ne forgesis danki ankaŭ al la subdistrikta ŝparbanko *Ostalb*, kies direktoro ĉeestis, pro ties financa subteno de la premiado. S-ro *A. Emmerich*, prezidanto de Germana Esperanto-Asocio (GEA), varme gratulis al la premiitoj, kiuj ja aktivis ankaŭ ene de la ĝenerala Esperanto-movado en Germanujo.

Eklezia muzikdirektoro *Ernst Leuze* ludis spritan komponaĵon nove faritan por n-ro 768 en ADORU "Floris mia ĝoj" laŭ franca kanto pri psalmo 122, kiel specimenon de sia momenta laboro. Li verkas komponaĵojn pri ĉiuj melodioj kaj ankaŭ zorgis pri la gitaraj akordoj en la libro. Multaj personoj partoprenis la Ekumenan Diservon en la historia preĝejo de Sankta Johano, situanta tuj apud la "limes-muzeo". Belan muzikon ĝuis la adorantoj, apartan donacon de la geedzoj *Franz Georg* kaj *Rita Roessler* el *Speyer* (orgeno kaj fluto). La tri premiitoj kune celebris la *Lima-Liturgion*, kiun iam ellaboris oficiale komisiitaj teologoj el ĉiuj eklezioj. La rezulto ĝis nun nenie estas oficiale agnoskita, sed plu dormas en la tirkestoj de la respondeculoj. Des pli gravas la aktiva alproprigo fare de kristanoj ĉe la bazo.

<Adolf.Burkhardt@t-online.de>

\* midio (fakvorto en komputiliko): registraĵo de sonoj.  
muzika melodio k.s., kiun oni povas aŭdigi  
per komputilo.

Adolf BURKHARDT  
em. pastoro luterana  
Gimpelweg 1, DE - 73235 - Weilheim / Teck / GERMANIO

### Terminologia angulo

#### Kvankam belaspekta, tamen plorinda! Kial?

Tuj dekomence mi konfesu mian nekompetentecon juĝi pri la nova PIV (SAT, 2002) ĝenerale. Sed speciale mi provu kritiki ĝin el vidpunkto de profesia sciencisto kun pli ol duonjarcenta praktikado. Tia vidpunkto promesas fideinde malkaŝi, ke la vortarego suferas pro sennombraj misoj. Ties kaŭzoj evidentiĝas plurspekaj. Ni tuŝu almenaŭ kvar:

1. Foje temas pri nesufiĉa erudicio de concernfaka kompilinto. Mi ekzemplu tion kadre de sciencoj, en kiuj mi profesie "hejmas".

1.1. En nenilingva literaturo mineralogia mi sukcesis trovi, ke la strikte kodigita nomo (angle *Chalcopyrite*) povus ricevi (ekz. analoge al *Cupropatite*) la alternativan nomon "*Cupropyrite*". Nu, en NPIV troviĝas la nomo "kupropirito", sub la kapvorto de pirito. Ties inventinto pene luvus inter Scilo (t.e. la franceska alergio kontraŭ la fundamenta fonemo Ĥ) kaj Ĥaribdo (t.e. la nepra malebleco anstataŭe uzi K, ĉar la mineralo Ĥalkopirito havas nenion komunan kun kalko). Aliflanke, la faktoj, ke la pirito mem ne enhavas kupron kaj ke kristaloĥemie ĝi apartenas al tute alia grupo ol Ĥalkopirito, restis por li sensignifaj, supozeble tial, ke lia mankhava erudicio ne sufiĉis por solvi la problemon science.

1.2. En nenilingva literaturo petrologia oni nomas la konsistigan materialon de la terkrusto, t.e. **rokaĵon** (germane *Gestein*) tiel kurioze, kiel faras NPIV: "petro"! Ĉi tiu nomo generiĝis, spite al la tutmonda praktiko, per mem-starigo de la pseŭdoprefikso **petrol**, kiu ja ekzistas diversfakaj: *Petromyzon*, *Petrophyt*, *Petroselinum* k.t.p.

1.3. En diverslingva literaturo pri neorganika ĥemio oni renkontiĝas kun ekvivalentoj de **silikato** (itale *silicato*) derivitaj el la latina *silex*, genitive *silicis*, fundamente **siliko**. La latina nomo de la ĥemia elemento *Silicium* originas ĝuste el la genitiva radiko *silicis*. NPIV procedis tute male, arbitre lanĉinte la nomon "siliciato", derivitan ne el siliko, sed el silicio. Jen procedo spitanta la kodigitan nomenklaturon de la neorganika ĥemio, kies semantika evoluo praviĝis historie.

2. Malpli gravajn pekojn liveris fonetisma aŭ grafisma miskompreno de fontlingvaj originaloj, kiun eblas ekzempli jene:

2.1. Mankas bona motivo por esperantigi la grekan diftongon *OI* per *OJ*, ĉar ĝi ne perturbas sole la internacian grafismon, sed eĉ prononce la fontlingvo ne allasas ĉi tie la frikativan palatalon *J*. Ekzemple la franca ortografio de *oldie* apenaŭ pravigas la NPIVan formon "ojdio". Krome: ali-okaze restas la originala *OI*, ekz. diploida, haploida. NPIV eble ĵetadis moneron, ĉu restu la reversa *OJ*, ĉu aversa *OI*...

2.2. Alifoje, oni trotaksas la franceskan prononcismon, senkonsidere pri la fontlingvaj grafismo kaj fonetismo. Kial la zamenhofa Munĥeno, pli proksima al la germana *München*, referencas al "Munkeno"? Kial "difenbakio" –



kvankam *Dieffenbach* estis la fama germana geologo?

2.3. Nemalofte, NPIV mise interpretas la konsonantduopon TS. *Rickettsia*, la gramnegativa bakterio, nomiĝas laŭ la usona esploristo *H.T. Ricketts*. Tiu *S* devas konsideriĝi kiel la t.n. saksa genitivo, do havanta nenion komunan kun la antaŭaj *TT*, sekve la NPIV-a formo "rikecio" devas esperantiĝi **riket-sio**. Same la mineralo **smitsonito**, nomita laŭ la femiisto kaj mineralogo *J. Smithson*, (etimologie "filo de *Smith*") devus anstataŭi la formon "smiconito".

3. Por ne troŝarĝi la kadron de mia artikoleto, prezentitiĝu ankoraŭ unu kaŭzo, pro kiu estas perturbita – fare de NPIV – celkonscia sistemo, ĉu terminologia, ĉu nomenklatura.

3.1. *Zamenhof* kaj la kleraj fosantoj de lia sulko sciis, ke la nominativa finaĵo de la latina ingenra deklinacio, tiu *A*, ne apartenas al la vortoradiko. Oni oficialigis la nomon **cikado** (*Cicada*), ne "cikadao". Sed kial aperis "karao", ne **ĥaro** por *Chara*? Ree Scilo kaj Ĥaribdo: Ĥ ne plaĉas, K ne eblas pro **homonimfobio** antaŭ la fundamenta radiko kar/. Rezultas nomenklatura malsistemo. Anstataŭ **ĥaracoj** fantomas "karaacoj".

3.2. Similo okazas pri la pingloarbo *Taxus*. La oficialigita "taksuso" timas koincidon kun la fundamenta radiko taks/. Rezultas la misa familia nomo "taksusacoj". Ĉu ankaŭ la veneno estu "taksusolo"? La fundamenta **bukso** (*Buxus*) bonŝance restas en NPIV, ĉar ne minacas homonima koincido. Sed la nomenklaturado ploras...

3.3. Fine pri la neŭtra finaĵo *UM*. La fundamenta **sakro** (*os sacrum*) homonima kun la verbo sakri, ne ĝenas. Sed "sternumo", la neoficialaĵo, evidente timas homonimecon kun la fundamenta radiko stern/, kvankam ĝuste tiu radiko elvokas la formon de la antaŭbrusta osto.

Ho ve, ĉu tiamaniere oni imagu planlingvon por internacia scienca uzado?

4. La kvara kaŭzo, kial NPIV povas misuzi sian vortaristan monopolon por trudi al Esperanto senbridan eksperimentadon spite al la jam estiminde vasta ĝia literaturo scienca, kuŝas – miaopinie – en cirkonstancoj **eksteraj**. Nome, la ekzistantaj institucioj [Universala Esperanto-Asocio (UEA), Akademio de Esperanto (AdE), Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE) k.a.] **ne tre** zorgas por disvolvi la lingvon tiom, kiom postulas ĝia aplikeblo en la sferoj sciencaj. Aktivaj unuopuloj (*Wüster, Haferkorn, Broise, Stop-Bowitz, Eichholz* kaj pluraj aliaj), sed ilia klopodo apenaŭ akiris efikan subtenon fare de la institucioj supre nomitaj. En AdE ekzistis Terminologia Centro, prizorgata komune kun ISAE, sed kio postrestas nuntempe? Enkadre de UEA oni fondis centron similan, sed ĉu ĝi funkcias hodiaŭ? **Resume**: Terminologia kultivado de Esperanto ne apartenas al la taskoj **prioritaj**...

Dr. Josef KAVKA

Lužná 7 – Vokovice

CZ - 160 00 Praha 6 / ĈEĤIO

Legantoleteroj

### Pri verbaj adjektivoj celaj kaj agaj

Pleje interesis min la artikolo de *Jan Werner* en SR 2/2002, p. 65-69. Mi konsentas kun li pri kelkaj klarigoj kaj pri kelkaj konkludoj: ekz. ke la klarigoj de Plena Analiza Gramatiko ne estas sufiĉaj, ke ekzistas "celaj adjektivoj" (sed ne tiuj, kiujn mencias la aŭtoro), ke celo ne estas ago, ke participo estas aga adjektivo, ke celo indikas konstantan funkcion kie la ago ne ĉiam aŭ ne en la parolmomento okazas.

Mi malsamas pri pluraj Esperantologiaj ideoj kaj klarigoj:

- 1) Ni devas klarigi lingvajn fenomenojn en Esperanto laŭ Esperantologia vidpunkto, ne laŭ etnaj lingvoj.
- 2) La aŭtoro komprenas la participajn adjektivojn kiel indikantajn iujn tempojn, anstataŭ aspektojn. Tiel li daŭre substrekas, ke "anta" montras prezencon, dum ĝi montras nefinitecon de la ago.
- 3) La aŭtoro forgesis mencii, ke multaj adjektivoj el verba radiko (aŭ radikaro: kuniĝa cirkulero) estas maskitaj prepozitivoj (maskitaj, ĉar forlasatis la prepozicio). Tiel liaj sega maŝino, labora ilaro, puriga teĥnologio, desegna papero, luma radio, mezura aparato kaj bremsaj ringoj venas el, kaj povas esprimi kiel, porsega maŝino (= maŝino por segado), porlabora ilaro, pri-puriga teĥnologio, pordesegna papero, priluma radio, pormezura aparato kaj porbremsaj ringoj kiuj ĉiuj elvenas el prepozitivoj: ringoj por bremsado, ktp. Fakte estas pli ĝuste kaj pli praktike uzi en ĉiuj tiuj kazoj ordinarajn kunmetojn: segmaŝino, laborilaro, purigteĥnologio, desegnopapero, lumradio, mezuraparato kaj bremsringoj.
- 4) La aŭtoro tute ne mencias, ke estas sufiĉe grava signifodiferenco inter la kunmetaĵo kaj la adjektiva formo (porbremsaj ringoj) aŭ la analiza formo (prepozitivo), kiun lastan li cetere ne ŝatas. Se la simplaj adjektivoj menciitaj ĉiuj estus same originalaj kiel la participaj adjektivoj, ili estus erare uzitaj de la aŭtoro, ĉar ekz. sega maŝino estus ne maŝino por segi; "sega" indikus kvaliton, rilaton. Laŭ multaj Esperantologoj la elverbaj adjektivoj estas mallongigoj por participaj adjektivoj aktivaj kaj pasivaj: apartiga tavolo = apartiganta tavolo, sida meblo = sursidata meblo, korekta klarigo = korektita klarigo. Mi emas samopinii nur kun la –ita-mallongigoj, sed sekve de tio ni havus du signifojn eblajn por ĉiu tia adjektivo:
  - a) korekta = rilatanta al korektado = korekta laboro, kaj
  - b) korekta = korektita = korektita vorto. Sed mi preferas ĉiam uzi "korektita" se necesa, kaj uzi "korekta", "bata" ktp. nur por rilatanta, kaj por la "celo" de